

TELOPEO

Oficiala Organo de La Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrujo

Volumo 58, Numero 06, junio 2023

Esperanto Domo, 143 Lawson St, Redfern, Sydney NSW 2016, Aŭstralio
Redaktoro: Dmitry Luŝnikov, Provleganto: Nicole Else

Estrarkunveno de EFNSK

Dmitry Lushnikov, direktoro de EFNSK

La 4-an de junio ni havis estrarkunsidon. Jen kelkaj punktoj pri kiuj ni diskutis:

- Riparado de la fabriko:

Sufiĉe multe da akvo envenas kiam estas pluvego. Jonathan kontaktis 2 kompaniojn por akvorezisti la konstruaĵon. Malkonstruado de internaj muroj.

- Laborkunveno:

Jonathan proponis ke ni organizu laborkunvenon por decidi kion necesas konservi kaj kio povas esti forĵetita en la oficejo kaj en la malsupraj ŝrankoj. La dato proponita estas dimanĉon la 6-an de aŭgusto.

- Videoprojekto: Jonathan skribis artikolon.

- Sunpaneloj: Adam skribis artikolon.

La venonta estrarkunsido okazos dimanĉon la 2-an de julio je la 9a horo matene per zoom.

Ĉiuj estas bonvenaj partopreni kaj doni al ni ideojn por disvastigi Esperanton.

Esperanto en videoprojekto en Japanio kaj Aŭstralio

Jonathan Cooper, prezidanto de EFNSK

La 22an de majo, du gravaj kaj famaj aŭstraliaj artistoj, nuntempe loĝantaj en Japanio, skribis al Esperanto NSW kun interesa peto. Ili kreas videaĵon kun priskribo rakontita en Esperanto. La artistoj, Claire Healy kaj Sean Cordeiro (claireandsean.com), eksplikis kial ili interesiĝas pri Esperanto:

- La tutmonda optimismo de la lingvo
- La geografia proksimeco de ilia hejmurbo Blackheath al Mount Victoria, hejmo de la historiaj esperantistoj Dietrich Rienits kaj Hermann Ritz
- La filmo Incubus (1966)

La temo de la rakonto estas tre aŭstralia afero: "a sausage sizzle" (kradrostado kun kolbasoj). La peto estis por du aferoj: tradukado de angla teksto en Esperanton, kaj voĉlegado de la teksto. Dmitry, Nicole kaj mi konsentis helpi, ĉar ni kredis, ke io, kio uzas Esperanton en publika projekto povus iel antaŭenigi la E-movadon. Do, Dmitry faris la unuan tradukon, Nicole korektis kaj redaktis ĝin, kaj mi registris la rakonton en profesia sonstudio.

La videoprojekto, nomita Team spirit (Teamspirito), estos montrata en Niigata, Japanio, kaj en septembro estos parto de sola ekspozicio en Mudjee, NSK.

Jen traduko de parto de mura teksto panelo, kiu eksplikas la projekton:

Tiu verko esploras la malsamajn nivelojn de komunuma kunlaboro, kiujn ni spertas en nia ĉiutaga vivo: loka komunuma kunlaboro kaj tutmonda kunlaboro.

Nia videaĵo estis filmata ĉe la kajtbatalo de Shrione de 2023. Tiu matsuri (festivalo) estas mirinda kaj bela produkto de grupoj laborantaj kune la tutan jaron por krei tre amuzan kaj iomete danĝeran tutsemajnan sperton.

Dume, la rakonto kiun oni aŭdas samtempe estas pli banala kaj ĉiutaga. Ĝi temas pri homoj kunlaborantaj por kolekti monon por loka bonfarado. Kuiraj vendi kolbasojn estas tre aŭstralia maniero por ricevi monon por la komunumo. Ĝi estas ago kiu povas esti vidita en ajna semajnfino, en ajna urbo en Aŭstralio.

La kolizio de ĉi tiuj du malsamaj komunumaj agoj en la artaĵo elstarigas la malfacilaĵojn implikitajn en transkultura komunikado. Ĉu ni, kiel eksterlandanoj, povas vere kompreni la kajtbatalon Shrione? Aŭ ĉu japanoj povas kompreni la kulturan signifon de la kuirado de kolbasoj?

Substreki la ideojn de kunlaboro kaj kompreno estas la lingvo, kiun ni uzis por nia rakonto. La lingvo estas Esperanto... konstruita lingvo, kreita en 1887, kreita kun la espero, ke ĉiuj homoj de la mondo povus kunhavi lingvon kaj komuniki kune.

Kaj jen la rakonto mem:

Mi alvenis en la parko iom frue. Ĉar mi neniam antaŭe helpis, mi pensis, ke estus bona ideo aspekti fervora. Alf, kiu estas la sekretario de la klubo, jam estis tie. Li havis trenstangon sur sia sporta utilveturilo, do li povis aliro la kradrostilon al sia aŭto. Li salutis min per amikema "Bonan matenon". Li jam malkroĉis la kradrostilon de la trenilo, kaj nun forviŝis la grason de siaj manoj per malnova T-ĉemizo. "Ĉu vi deziras helpi starigi la markezon?" li demandis. "Certe," mi diris, kaj mi sekvis Alf al la kofro de lia veturilo, kie ĉiuj aĵoj necesaj por la tendo estis metitaj. La pecoj ne estis pezaj, sed ili estis iom longaj kaj malfacile porteblaj. Do, estis bone, ke ni estis du por helpi porti ilin el la veturilo.

Post kiam ni starigis la strukturon ĉirkaŭ la kradrostilo, ni certigis, ke ĉiuj bazoj estas sekuraj, martelante tendokejlojn en la teron. Dum mi faris tion, Alf formovis sian veturilon tiel, ke la aliaj aferoj povu esti malŝarĝitaj pli proksime al nia loko. Estis ankoraŭ sufiĉe frue, kaj aliaj budposedantoj instaligis. La sinjorino kun kafĉaro vigle vendadis, certigante, ke ĉiuj havu sufiĉe da kafo.

"Klak, klak," la sono de movitaj markeztangoj plenigis la matenan aeron. Iom poste, Janet, la kasisto, alvenis kun ĉiuj aliaj aferoj: malmunteblaj tabloj, panbulkoj, kolbasoj, kondimentoj, margarino, cepoj ktp. Ankaŭ aliaj volontuloj alvenis, kaj ni starigis kelkajn laborspacojn. Alta ulo, nomata Andreas, duonigis la bulkojn, dum lia partnero Robin ŝmiris margarinton sur la tranĉitan panon.

Mi ricevis la taskon haki la cepojn, dum Janet komencis friti ilin sur la kradrostilo. La unuaj kolbasoj ankaŭ estis metitaj sur la kradrostilon, sur la cepojn. Ĉiuj surhavis silikonajn gantojn dum ili faris siajn taskojn, tiel, ke ni havis la impreson esti en operaciejo.

Dum la kolbasoj komencis kuirigi, Janet trapikis iliajn haŭtojn, kaj la fandita graso kaj vaporo eskapis el la truoj kun siblo. La graso fluis en la grandan amason da cepoj, helpante ilin malrapide bruniĝi. Estis ankoraŭ sufiĉe frue – tro frue por iu, kiu ne estis postebria, por deziri kolbason. Sed la aero estis plenplena de la peza aromo de cepoj kaj kolbasa viando. Verdire, ĝi estis iom intensa.

Dum ni estis iom malpli okupataj, ni ordigis la kondimentojn: renversante la preskaŭ finitajn botelojn, kaj elpuŝante restaĵojn en la botelojn, kiuj estis pli plenaj. Malrapide, niaj improvizitaj rubujoj pleniĝis per papertukoj, uzitaj gantoj, pakaĵoj, kaj forĵetitaj saŭcboteloj.

Pluraj homoj nun okupiĝis pri la kradrostilo. Kuiritaj kolbasoj estis stakigitaj kune, por resti varmaj, sed ne tro kuirigi. Dume, pliaj kolbasoj estis metitaj sur la kradrostilon.

Estis truo meze de la rostilo, kaj la troa graso elfluis en malplenan laktobotelon, kiun ni ricevis de la sinjorino kun la kafĉareto.

Dum la tago, ni devis anstataŭigi la botelon plurfoje. Ĉiufoje, kiam ni faris tion, ni certigis, ke ni firme fermis la ĉapon de la botelo. (Kelkajn jarojn pli frue, okazis incidento pro elverŝita graso, kaj pri tio, oni ankoraŭ parolis per duonŝerca tono.)

La pezaodoro de kolbasoj kaj cepoj en la aero baldaŭ allogis klientojn. Homoj neformale viciĝis, atendante ke iliaj mendoj estu pretaj. Ni alvenis kun multaj moneroj, kaj ni ne ricevis tro da kvindek-dolaraj biletoj dum la fruaj partoj de la mateno. Do, la kasisto ne havis tro da problemoj por redoni la taŭgajn monerojn. Homoj moviĝis ĉirkaŭ la markezo, manĝante siajn kolbasbulkojn, verŝajne por eviti esti kovrataj de saŭco aŭ glitiĝemaj cepoj. Ŝajne, ili ĝuis la manĝaĵon, dum ili babilis kaj ŝercis pri la fonto de la viando en la kolbasoj, ktp.

La tago pasis sufiĉe rapide: kuiraj, purigaj, servi klientojn. Tio estis amuza kaj okupata tago. La purigado ne estis tro malfacila, ĉar ni purigis dum la tuta tago. Ĉiuj helpis paki kaj remeti la aĵojn en la veturilojn

posttagmeze. Ni povis meti la rubaĵon rekte en komercan rubujon, kaj eviti la malagrablaĵon, ke iu havu ĝin en sia aŭto.

Fine, ni ricevis sufiĉe multe da mono por nia bonfarado. Ni kolektis monon por helpi rekonstrui ruĝan raketforman glitejon de la 'sesdekaj jaroj en la loka ludparko. La dezajno de la ruĝa raketo estas simila al la originalo, kiu iam ornamis la lokan parkon. Sed la glita parto nun devis esti kovrita, por ke la infanoj ne falu kaj vundiĝu.

Poste, la raketo aspektis kvazaŭ ĝi havas gigantan ruĝan kolbason, kiu elvenas el ĝia mezo kaj atingas la teron. Iusence, ĝi estis sufiĉe taŭga, konsiderante ĉiujn kolbasojn, kiuj estis kuiritaj kaj manĝitaj por akiri la financon, por pagi por la nova ekipaĵo en la ludparko.



Kinfoto de Teamspirito, kun japana subteksto

Kial sunpaneloj sur Esperanto domoj?

Adam Levy, direktoro de EFNSK

Kun ne eta kvanto da mono disponebla je ni, la Federacio havas nun la multajn opciojn pri kion fari por plibonigi la vivon de niaj membroj kaj por la longviveco de nia klubo kaj klubdomo.

La Esperanto-Klubo de Novsudkimrio estas bonega loko por diskuti pri la lingvo Esperanto kaj por kunveni kun aliaj esperantistoj. Tamen, la klubo ankaŭ povas fari pli por la medio. Unu maniero por tio estas instali sunpanelojn sur la tegmento de la klubejo.

Sunpaneloj estas efika maniero por produkti renovigeblan energion. Ili povas helpi la klubon malpliigi sian dependon de fosiliaj brulaĵoj kaj konservi la medion.

Por kompreni la signifon de sunpaneloj, ni devas unue konscii pri la efikoj de fosiliaj brulaĵoj kaj kiel ili malutilas nian planedon. La elektra energio produktita per fosiliaj brulaĵoj estas ĉefa kialo de klimata ŝanĝo. Kiam ni uzas fosilian energion, ni liberigas grandan kvanton da karbona dioksido en la atmosferon, kiu pligrandigas la efikon de la varmiĝo de la tero. Tamen, sunpaneloj estas senkarbonaj kaj produktas elektron per sunlumo, kiu estas senĉesa kaj nekaŭzanta damaĝon al nia medio. Per instalado de sunpaneloj, Esperanto Klubo povas kontribui al la reduktado de la karbona spuro kaj kontribui al la monda batalo kontraŭ klimata ŝanĝo.

La instalo de sunpaneloj ankaŭ povus havi ekonomiajn avantaĝojn por la klubo. Sunpaneloj povas helpi la klubon ŝpari monon je ĝiaj energikostoj.

Rilate la financajn aspektojn, ekzistas multaj avantaĝoj de la instalo de sunpaneloj. Unue, solarpanelenergio estas senkosta, ĉar la suno ne petas monon por la forto, kiun ĝi provizas. Post la komenco de la instalo, la klubo povas atingi sendependecon de elektro servo kaj ne plu devas elpagi altajn energikostojn. Krome, la klubo eĉ povas iom profiti el la superfluanta energio, vendante ĝin al la elektra reto. Tiel, per sunpaneloj, Esperanto Klubo povas ne nur redukti sian energikoston, sed ankaŭ eble ricevi monan kompenson.

Mi instigas la Esperanto-Klubon de Novsudkimrio instali sunpanelojn sur la tegmento de Esperanto-domo. Ĉi tio estas bona maniero por la klubo helpi la medion kaj konservi monon.



EFNSW: Esperanto Domo, Unua Dimanĉo de la monato estrarkunsido 09:00 ĝis 11:00
Kontaktu Jonathan Cooper 0403 358 941

Manlia Esperanta Klubo ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater, Suda Stejno
1a kaj 3a Sabatoj; 10:00 atm; Komencantoj Bonvenaj
Kontaktu Roger (02) 9976 6320 manly@esperanto.org.au

La Meza Marborda Grupo; 3a Dimanĉo de la monato; kontaktu Joanne (02) 4362 8287
Novkastelanoj: Kontaktu Andrew (02) 4951 2084 newcastle@esperanto.org.au

La Suda Marborda Grupo; malgranda grupo kunvenas foje je Bega.
Komencantoj Bonvenaj. Penny Vos (02) 6495 2922

La Esperanto Federacio de Nova Sud-Kimrujo:

Esperanto Domo,
143 Lawson St, Redfern 2016 (02) 9319 4775;
Malfermata ĉiun merkredon, 10:00 – 20:00
(*Sonigu elektran zumilon ĉe la strato*)
www.instagram.com/esperanto_nsw/
www.facebook.com/EsperantoNSW/
www.EsperantoHouse.org.au
retadreso: nsw@esperanto.org.au

Prezidanto:	Jonathan Cooper
Vic-prezidanto:	Andrew Spanenberg
Sekretario:	Nicole Else
Kasisto:	Alan Turvey
Estrarano:	Chris Betcher, Adam Levy, Dmitry Luŝnikov

